

Protokolo

de la KOMITATKUNSIDOJ en la ILEI-Konferenco en Matanzas, Kubo

Lundon, la 12-an de julio, 2010

El la estraranoj, nur la prez. de la estraro, Stefan MacGill, ĉeestas. Envenis raportoj pri la sekcioj de ILEI. Ankaŭ la Statuto kaj Regularo de ILEI estas surloke konsulteblaj. La jarraporto pri 2009 estas legebla en la Konferenca Libro, inkluzive de tiam nerevizoritaj financaj rezultoj.

La prezidanto kontrolas la nombron da komitatanoj; ĉeestas 12 komitatanoj, sed necesas 17 por kvorumo.

La subskribinto, Simon Smits, pretas fari raporton.

La prezidanto diras ke la protokolo de la postelektaj Komitatkunsidoj en Krakovo aperis en la liga hejmpaĝo, sed ne estas disponebla en Matanzas. Pri la mallonga kunsido ĝis la elektoj ne ekzistas protokolo. Oni priserĉos ĉu ekzistas skriba raporto de tiu kunsido.

UEA aprobis ĝisdatigajn ŝanĝojn al la kunlabora interkonsento origine subskribita en Havano en 1990, Pro tempomanko definitiva decido povas okazi dum dua kunsido; tio validas ankaŭ por aliaj punktoj.

Aliĝo de Hispana Sekcio.

La prezidanto konkludas ke nuna aliĝo ne povas esti pritaksata, ĉar sekcio devas havi 5 membrojn kaj tiujn la Hispana Sekcio nun ne havas.

Sekvas diskuto pri la speco de membroj por aliĝpeto kaj pluivivigo: ĉu ili devas estis “internaciaj” aŭ “naciaj”(esti membro nur de la enlanda unuiĝo).

Ni diskutis pri la ricevitaĵ informoj kaj pri la raportoj. La prezidanto informas ke la jura sidejo de ILEI estas ŝanĝita de Hago al Roterdamo. Ni malfermis bankkonton en Nederlando; restas bankkontoj en Svedio.

Komisionoj

Pri la Ekzamena Komisiono la prezidanto diras ke ĝi bone funkcias.

Regulara komisiono: provizore restu atendanta taskdifinon de la estraro

Pri la Lerneja Komisiono ne envenis raporto.

Unu persono de la Universitata komisiono sendis raporton.

Funkcias rilatoj kun Unesko danke al francaj kolegoj. Ekzistas listo de celoj kiuj ne estas plenumitaj (vidu paĝon 20 de la Konferenca libro).

La sveda sekcio sciigas ke ĝi havas estraran problemon pro manko je funkciuloj . Ĝi havas tamen funkciantan retan paĝon, precipe por Svedio mem.

Sciigo ke transpago de kotizo per banko el iuj landoj nuntempe kostas tre multe. Ni trovis solvon por pagoj de kroatoj per kontanta pago al la subskribinto.

Krakova protokolo ekzistas en formato PDF, interalie en la ILEI-hejmpaĝo, por la sesioj post la elektoj. Mankas protokolo por la parto ĝis la elektoj. Pri tiu parto, oni serĉu en raportoj pri Krakovo kiuj aperis por trovi notojn pri la komitatkunsido.

Interkonsento UEA-ILEI. UEA akceptis ĝian ĝisdatigon.

Statutinterpreto:

Lasita por la dua kunsido.

Raporto pri 2009.

La raporto aperis en la Konferenca libro, kun kun membro-statistiko. Propono prokrastita ĝis la dua kunveno por doni tempon al komitatanoj ĝin studi, kaj tiam decidi; akceptite.

Financa kontrolado devas okazi en du landoj. La spezoj por 2009 estas prezentitaj en la jara raporto de la estraro. Tiuj montras, ke la konferenco en Krakovo estis por ILEI enspeziga je 3909 euroj, sed la sumaj jaraj spezoj de la ligo por 2009 havis deficiton de 2483 euroj. (Fine de aŭgusto 2010, tiu spezokonto, kune kun la bilanco en eŭroj kaj la raportoj pri la eŭro-bazitaj kaso kaj fondaĵoj estas akceptitaj de la nederlandaj revizoroj. La svedkrone bazitaj sumoj bezonas revizoradon en Svedio.)

Stefan volas fermi la kunsidon kaj daŭrigi pri Juna Amiko pro lia rilato kun tiu gazeto. Li havis redaktorajn problemojn. (Ĉar unu el la redaktoroj fariĝis prezidanto de ILEI, unu numero prokrastiĝis). Sed nun oni trovis kandidaton por la redaktoreco, instruistino en Hungario, kiu kun sia klaso regule partoprenas en internaciaj interŝanĝoj.

Sekvas diskuto pri la membrokotizoj por ILEI, por presitaj kaj retaj aliroj al IPR. Parolinta pri la disvastigo de la gazeto per interreto al ne-abonantoj, laŭ Stefan oni uzas pasvorton por la abonantoj.

Estas demando pri la rilato inter Edukado.net kaj ILEI. La respondo estas ke ne ekzistas jura rilato inter ambaŭ, sed bona kunlaboro. Ankaŭ estas kunlaboro kun UEA.

Ni atingas la finon de la kunsido; ĉe demando pri " Juna Amiko" la prezidanto diras ke li pretas daŭrigi diskuton pri tio postkunside. Sekvas diskuto pri la gazeto, ankaŭ pri paperaj kaj retaj abonoj por IPR. Kaj pri la membro-kotizoj por tio.

Matanzas, la 12-an de julio 2010.

Simon Smits, raportanto. Prilaboro: SMG.